**B U L T E N O** DE

LABORISTO LIGO ESPERANTISTA EN ČEHOSLOVAKIO

JARABONO POR ČSR Kč 6,- POR EKSTERLANDO 4 RESPONDKUPONOJ POR MEMBROJ DE UNUIGITAJ LIGOJ
"L.L.E." PLZEŇ KAJ "Č.L.A.E." ÚSTÍ N/L: SENPAGE.

POŜTĈEKA KONTO DE L.L.E. PLZEŇ 87.136 PRAHA DE Č.L.A.E. AUSSIG A/E: 45729 PRAHA

ADRESO LABORISTA LIGO ESPERANTISTA, PLZEŇ, PEKLO ČSR

12a jarkolekto. J u n i o 1938. nro. 6

## Jubilea ekspozicio en Plzeň.

De la 25. de juni ĝis la 11. de septembro 1938 okazos en Plzeň VI. Laborista ekspozicio sur vastaj kampoj apud stadiono de D.T.J., kaj sur ambaŭ bordoj de la rivero Mže ĝis laborista popoldomo "Peklo". Ekspoziciaj objektoj estos ankaŭ lokitaj en haloj de popoldomo, en ĝardena novkonstruaĵo kaj en kvin lernejoj. La tuta ekspozicia surfaco en pavilonoj konstruoj kaj sur kampoj, inkluzive de amuza parto sur maldekstra bordo de la rivero Mže, estas ĉirkaŭ 100.000 m2.
La ekspozicio estas jubilea, ĉar ĝidatmemoras aperon de la unua laborista ekspozicio en jaro 1888, la respubliko festas sian dudekjaran ekziston kaj la laborista partio sesdekjaran datrevenon. La ekspozicio havas 22 ĉefpartojn kaj 16 memstarajn ekspoziciojn, inter kiuj troviĝas ankaŭ la memstara ekspozicio de laboristaj esperantistoj. La ekspozicia komitato atendas dum la daŭro de la ekspozicio viziton de minimume 500.000 da personoj. Al Plzeň sin anoncis jam 38 karavanoj el tuta respubliko. Okazos pli ol 30 kongresoj kaj asocitagoj, inter ili ankaŭ estas knuvokita je la 6. kaj 7. aŭgusto la I. Tutlanda kongreso de laboristaj esperantistoj.
Dum via vizito de la ekspozicio kaj la kongreso, vi vidos en Plzeň laboristajn domojn, grandajn kooperativajn koloniojn de familiaj domoj kaj pli ol 30 kooperativajn ludomojn. La urbo Plzeň de la socialistaj laboristoj kaj intelektuloj bonvenigos vin kore kiel forta digo de demokratio kaj defendantoj de socialistaj ideoj.

Jonák.

## I. Tutlanda kongreso de laboristaj esperantistoj en Plzeň.

Sabate la 6. kaj dimanĉe la 7. de aŭgusto 1938 okazos en Plzeň la I. Tutlanda kongreso de laboristaj esperantistoj. La liga komitato prizorgos tre bonan programon por ambaŭ nomitaj tagoj, kaj ni firme esporas, ke certe ĉiuj partoprenantoj estos kun niaj aranĝoj kontentaj. La morala devo de ĉiu nia ano estas, jam nun vigle propagandi la kongreson, por ke la partopreno estu la plej granda. La kongreskotizo estis je la lasta ĝenerala kunveno fiksita je Kč 5.--.
Gekamaradoj, aliĝu jam nun al la kongreso, por ke ni povu ĉion bone prizorgi, ĉar lastatempe ne estos eble al ni ĉiujn dezirojn plenumi. Ni ankoraŭ eldonis kongres-flugfolion kun necesaj informoj por la partoprenantoj de la kongreso.
La nuntempaj cirkonstancoj devigas ĉiujn laboristajn esperantistojn por unuecigo en unu granda laborista esperantisto. Je nunjara kongreso ni intencas fiksi la pluan vojon kaj laboron de nia unuigita ligo.

J -K

## Ni sincere invitas vin al Plzeň.

Okaze de la I. Tutlanda kongreso kaj VI. jubilea-laborista-industria-ekonomia ekspozicio ni sincere kaj korege invitas vin al Plzeň.

Dum tiuj tagoj vi havas okazon tre bone ekkoni nian industrian urbon kaj la tagoj travivitaj inter la plzeň-aj esperantistoj estos por vi certe ne forgeceblaj. Ĉiu partoprenanto de la kongreso /ekspozicio/ rabaton je fervoje je ekspozicia legitimacio, kiu kostas -inklusive enirbileto por la ekspozicio- Kč 8.-- La ekspozician legitimacion vi ricevos ĉe: Kancelář VI. jubilejní výstavy, Plzeň, Mrakodrap, aŭvi povos ĝin mendi ĉe nia ligo kaj ni ĉion alian prizorgos mem.

- - - - - - § § § § § § - - - - - -

Laboro por la tutlanda "Esperanta kongreso".

Ĉu la fakto, ke la malmultaj laboristaj esperantistoj en nia lando bezonas du socialistaj organizoj, estas instiga por izoluloj, sin organizi?
Se al kelkaj nepre plaĉas havi la propran budikon, do oni ne riproĉu al alitendenconoj malfermi la sian.
Ni propagandu por kunvonego en Plzeň, ni foruzos minin, tempon, sed nia postulo estas: unu ŝtato, unu laborista esperanta organizo, al kiu apartence ĉiu senddiference de nacio, kaj politika konvinkiĝo, Efektivigo de la forta organizo malnecesigos polemiki kun neorganizitaj sektanoj de sama mondkoncepto.
Ni sendis ankaŭ al la estraro de Ĉ.L.A.E. instigan proponon por kunhelpi krei tutstatan organizon. Feliĉe, la estraro mem laŭtigis la volon al enkadriĝo en nian L.E.A.
La cirkonstancoj akriĝis tiel, ke oni povas diri, ke la ekzemplon al donis niaj kontraŭloj.

Strangaj esperantistoj !

En diversaj landoj partoprenis la majan demonstracion ankaŭ esperantistoj kun standardoj. La pli kreskanta faŝismo ege malhelpas tian porpacan laboron. Aperis en Germanio libro: "Mia batalo" kaj en ĉi tiu batalo batalas la aŭtoro kontraŭ la Zamenhofa ideo, asignatan kiel "judaĵo".
Ankaŭ la agado de multaj esperantistoj estas atentinda! Ili estas tre lernemaj esperantistoj, sed ĉi jaro ili estis videblaj en la procesio de la naciistoj. Tiuj esperantistoj ne kantis: "En la mndon venis..." sed germane: "Ne ekzistas io pli bela, ol se soldatoj militiras...". Ĉi tiuj "samideanoj" estis tiel singardemaj, ke ili forgesis hejme la esperantan insignon, eble pro manko de placo.
Sed ekzistas ankaŭ alia speco de neutralaj germanaj esperantistoj, tiuj, kiuj estis fidelaj al sia tradicio ekskursi la 1. de majo kun ĉeĥaj samideanoj. Ni, laboristaj esperantistoj fieras je tiuj verdstelanoj, kiujn la faŝista ondo ne povis forbalai. Tiuj pioniroj konsciiĝis, ke okaze do faŝista reĝimo la multjara laboro, la oferaj tempoj kaj mono vaniĝus. Al ĉiu ano de la diversnacij popoloj en nia respubliko lamsaman rajton efektiviganto sur la bazo de la konstitucio. Tion direktu la laboristaro al la adreso de ĉeĥaj, germanoj kaj aliaj ŝovinistoj.
Do "Ne al glavo sangon soifantan . . . . . . . "
Malgraŭ subpremo pli alten nia standardo! Pioniroj.

- - - - - - § § § § § § § - - - - - -

Ĉiu homo havas du edukadojn. Unu, kiun li ricevas de aliaj,
kaj unu pli gravan, kiun li donas al si mem

Anon.

## Zamenhofa saĝo.

Vi faris malgrandan proveton de laborado kaj kiam ĝo restis sen deca sukceso vi tuj ĉesis. Sed se nia laborado apartenus al tuj dankoportaj aferoj, kiuj estas kronataj de tuja granda sukceso, tiam ni facila trovus milionojn da laborantoj kaj tiam ni ja vin ne bezonus! Vi ĉiuj- /via nombro estas jam tre-granda/, kiuj stras nun kaŝite kaj atendas, - ne promesu aliĝi al ni, kiam la mondo maturiĝos, ĉar tiam ni jam ne bezonos maturigantojn kaj post la venko ni ne bezonos helpantojn.
Se vi amas nian ideon, laboru por ĝi nun kiam ĝi postulas ankoraŭ malfacilegan BATALADON; staru forte kaj ne kaŝite, kiel granito inter ondoj, nun, kiam monaj rimedoj estas por ni eksterordinare gravaj kaj enhavas en si la demandon "esti aŭ ne esti". La Esperanto 1893.

## Generalo kaj kaporalo.

En la liberiga milito generalo Washington /Vaŝingtono/ rajdis civilvestita laŭlonge de la fortikaĵoj. Sur iu izolata posteno li vidis du soldatojn komandate de kaporalo fortrenantaj pezan arbon. La arbo estis tro peza, kiom ajn la soldatoj klopois levi ĝin. La kaporalo staris apude, komandante kaj furiozante, sed ne farante ion.
Washington deĉevaliĝis kaj diris ĝentile al la kaporalo: "Ĉu vi ne povas helpi tiujn ĉi-du virojn?"
"Sinjoro-, mi estos kaporalo; ĉu vi ne vida tion?"
"Pardonu, sinjoro, ĉu do mi eble povas helpi viajn soldatojn?"
"Prenu en la mezo."
La kaporalo rigardis malestime al la civilulo kaj komandis. Triope ili firtrenis la arbon. Post tio Washington diris iom indiferente: "Se vi iam ankoraŭ bezonas helpon, do informu min per komisio".
Incitita per la tono, la kapralo respondis: "Mi diris al vi, ke mi estas kaporalo . . . . kiu vi estas?"
"Ho mi estas generalo Washington, sed de la nuna momento vi jam ne estas plu kaporalo".

- - - - - - § § § § § § § - - - - - -

## Sciigoj de L.L.E. Plzeň-Peklo.

\+ Gekamaradoj! Kiuj ankoraŭ ne pagis jarkotizon aŭ abonpagon por kuranta jaro, estas petataj plej baldaŭ plenumi sian devon al la ligo. Se vi eble ne havas ligan poŝtĉekon, sendu la monon per ordinara poŝtĉeko kaj enskribu nro. 87.136 PRAHA, Laborista ligo esperantista, Plzeň-Peklo. Liga jarkotizo estas Kč 6.--, jara abono de la liga "Bulteno" estas Kč 6.--. La membroj de la ligo kiuj pagis jarkotizon ricevas la "Bultenon" senpage. La liga komitato prizorgos ankaŭ por-la membroj diversaj esperantajn insignojn, glumarkojn, lernolibrojn, vortarojn ktp.

\+ 8an de junio okazos en Peklo kunveno de liga komitato, estas necese, ke ĉiuj komitatanoj ĉeestu. Ankaŭ ni atentigas niajm membrojn, ke ĉi jaro okazos en nia respubliko vico da signifaj festoj kaj jubileoj, kiel ekz. 60jara jubileo de soc. dem. partio 4. - 6. de junio en Praha kaj estus bone, ke dum ĉiuj similaj festoj niaj anoj portu la esp. insignon kaj propagandu Esperanton.

\+ La redakcia rondo decidis eldoni al la tutlanda kongreso kongresnumeron de la "Bulteno". Ĝi aperos en julio. Sendu taŭgaj artikoloj!

\+ Por la presfondo sendis: K-do B e r g m a n J., Gablonz Kč 10.--

\+ La VI. jarkunveno de Ĉ.L.A.E.

La jarkunveno de la Ĉeĥoslovaka laborista Asocio esperantista okazis 15an de majo en Langenar ap. Heide. Partoprenis gek-doj el 7 lokoj.
Oni decidis eldonadi presitan gazeton "Libereco". La laborprogramo de la nova ligostraro enhavas kvin punktoj. La loko de venontjara jarkunveno estas destinita Pfaffendorf ap. Bodenbach.

\+ S t o n a v a .
La 15. de majo okazis sekcia kunveno. Ĉefa diskutpunkto estis: kiel pli vigligi propagandan laboron por esp. movado en nia loko. Parolis al tiu temo preskaŭ ĉiuj ĉeestintoj. Venonta kunveno okazos la 12. de junio en Laborista domo kaj havos speciale gravan programon.

+++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

G E K A M A R A D O J !

Ĉu vi ĉiuj volas helpi al presfondo de nia "Bulteno" ?
Je ! do; venu al k-do Vágner – razisto kaj frizisto
por tondigi viaj haroj kaj razigi barbon kaj k-dinoj
ondumigi, daŭraondumigi aŭ akvoondumigi. El ĉiu sumo
de vi pagita, li transdonos 50 % por "Bulteno"
Gekamaradoj! ĉu vi kredas, ke tiamaniere nia "Bulteno"
povas ĉiumonato gajni 100.-- Kč eĉ pli multe? Provu
tion kaj alvenigu-viajn gefamilianojn kaj konatulojn !!!
Postulu kvitancon, kiun vi transdonu al la kasisto de
la ligo. Adreso de kamarado V á g n e r Antonín
Plzeň-Slovany, Zahradní 33.

+++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

No S.A.T.-anoj, progresanuloj a t e n t u ! La Plena Vortaro de SAT. estas havebla por Kč 70.--. Legemuloj kiuj-interesiĝas pri Sennaciulo, povas ĝin ricevi tre malkare por Kč 1.30 po unu n-ro.
La SAT-kongreso okazos de 3-7 aŭgusto en Bruselo. Aliĝmono estas 30Kč, aliĝu tuj. El Plzeň jam aliĝis 4 gek-doj. Pri ĉio skribu al kamarado: Pelcman Jaroslav, Plzeň-Hradiště.
Aŭ rekte al Sennacieca Asocio Tutmonda. 67 Gambet. Paris XX.

Lens., /nordfrancia minista urbo/.
16. - 18. de aprilo estis IIa kongreso de F.E.T. /Laborista Esperantist Asocio en franclingvaj regionoj/ en Lens.
Partoprenis pli od 140 gek-doj. Kongreso montris brilan sukceson. Krom kelkaj gravaj decidoj, oni ankaŭ decidis eldonadi dumonatan propagandan gazeton "Travailleur Espérantiste" kiel 16- paĝan.

\- - - - § § § § § § § - - - -

Ĉu vi jam aliĝis al la I. Tutlanda kongreso en Plzeň ????
Ĉu vi jam pagiz jarkotizon ????
Ĉu vi jam almenaŭ unufoje subtenis la ligan presfondon ????
Ĉu vi ĉie kaj ĉiam propagandas nian laboristan esperantan movadon ????
Ĉu vi konstante propagandas la I. Tutlandan kongreson ????

La spirito de dubo estas la animo de la scienco.
Anon.